

N. N. 32,

Elkreskis  
branĉeto*tradukita de Joachim Gießner*

1. Elkreskis rozbranĉeto  
el rozarbust' de Di'.  
Aŭguro de profeto  
rakontis jam pri ĝi.  
Naskiĝis rozfloreto  
meze en vintra nokto  
laŭ diro de profet'.

2. Ja naskis tiu rozo -  
Jesaj' prognozis ĝin -  
el sia korpo sproson  
Mari' la virgulin'.  
Laŭ dipotenca vol'  
ŝi naskis Di-infanon  
por tuta mond' konsol'.

3. Kaj tiu belfloreto  
tre hele lumas ĝi.  
Obskuron la brileto  
forprenas nun de ni.  
Vi hom' kaj vera Di'  
el pekoj kaj suferoj  
estas savant' por ni.

*Traduko de la Germana poemo  
"Es ist ein Ros entsprungen" de  
N. N. 32 en Esperanton de JOA-  
CHIM GIESSNER (\*1913-12-23 -  
†2003-11-25).*

*Arg-618-1244 (2012-10-18  
21:24:22)*

*Tiu ĉi poem-traduko tro-  
viĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub  
<http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.*

N. N. 32,

roz- Burgonis rozarbedo

*tradukita de Guido Holz*

1. Burgonis roz-arbedo  
el delikata sin'  
laŭ olda kant-heredo,  
Jiŝaj la origin';  
ekĝermis ĉarma flor'  
dum frosta vintro-tempo  
je noktomeza hor'.

2. El virgulin' beata,  
mirinda roz-arbed',  
elvenis flor' benata  
laŭ diro de profet'.  
Laŭ sankta Di-ordon'  
ŝi naskis infaneton  
por nia sav' kaj bon'.

3. Kaj ĉi floreto belas,  
amindas per parfum';  
la nokton ĝi forpelas  
per sia brila lum',  
nin helpas el mizer',  
el pek' kaj morto savas;  
Li, hom' kaj Di' en ver'.

*Traduko de la Germana poemo  
"Es ist ein Ros entsprungen" de  
N. N. 32 en Esperanton de GUI-  
DO HOLZ (\*1920 - †1989).*

*Arg-618-1245 (2014-09-07  
14:38:29)*

*Tiu ĉi kanto troviĝas en la  
eklezia Esperanta kantlibro  
"Adoru", n-ro 223. Vidu an-  
kaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgonis1.html>.  
Pri Guido Holz vidu la retejon  
[http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido\\_Holz](http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz).*

N. N. 32,

Rozbranĉo  
forĝermadis*tradukita de Felix Ney*

Rozbranĉo forĝermadis  
el trunk' de nobelec'.  
Prauloj jam kantadis:  
de Jiŝaj ĝia spec'.  
Floreton portis ĝi,  
en akra vintro estis,  
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita  
Jesaja de profet':  
Maria netuŝita,  
de kiu la floreto'.  
Eterne volis Di':  
naskinta infaneton  
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro  
alvenas bonodor'  
Ĝi brilas en la koro,  
mallumon pelas for.  
Homido, Dia Vort',  
nin el sufero helpas,  
De pek' Savant' kaj mort'.

*Traduko de la Germana poemo "Es  
ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32  
en Esperanton de Felix Ney.*

*Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)*

*Tiu ĉi Esperantigo tro-  
viĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancœ1.html>.*